

# La Bulteneto

Numero 32 ❁ Jaro 2019

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO



Schmitz - Attersee - Rollig

ATTERSEE

FAJREJO

Ekspozicio en Belvedere 21  
ĝis la 18a de aŭgusto 2019



# *La Bulteneto*

Numero 32 • Jaro 2019

Redaktejo - eldonejo - presejo:

Rudolfnergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio.

La cifereca versio estas senkosta.

Informoj pri la tarifoj de la presita versio kaj anoncoj:

[esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at).

Papero: Mondi Color Copy 120 g m<sup>-2</sup>.

Unverkäufliche, private Ausgabe – Nevendebla, privata eldono

Skriboj: Calibri (teksto) kaj Times New Roman (klarigo de la bildoj).

La paperan version ricevas donace

Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, Aŭstrio,

aliaj bibliotekoj post peto.



Sur la unua paĝo:

D-ino Britta Schmitz, kuratorino de la ekspozicio,

Christian Ludwig Attersee kaj

ĝenerala direktorino de Muzeo Belvedere Stella Rollig

antaŭ la bildo de Attersee

„Junggesellin mit Knie-Segel“

„Fraŭlino kun Genua Velo“ 1972,

multobla tekniko sur kartono.

Foto Klag



La ekspozicio „Feuerstelle“ (fajrejo) metas la fokuson sur la unuajn dudek jarojn de la preskaŭ 60 jarojn longa kreiva kariero de Christian Ludwig Attersee.

Ĝi montras ĉiujn aspektojn de la unika bilda lingvo de la artisto.

La verkaro kaj la artista nomo Attersee iĝis komerca marko, tial oni povas paroli pri Attersee-igo de lia mondo.

Pop-arto, humuro kaj ironio karakterizas lian laboron.

Temoj de lia propra mondo ĉefrolas en lia laboro: Vetero, velboatado, naturo, muziko, lingvo, beleco kaj erotiko.

Jen konkretaj ekzemploj de lia kreado en la unuaj dudek jaroj:

Kuboforma mamzono, proteza alfabeto, etiketoj por vinboteloj, Attersee-kolbaso, poŝtmarko, Attersee-domo.

En la frua fazo de lia verkaro intense flamantaj koloroj estas tipaj kaj memorigas pri la pop-arto.

Ekde la mezaj 1970aj jaroj li transiris de pop-arta al gesta-esprimiva desegna stilo kaj poste lia stilo iĝis pli kaj pli pentra.

La ekspozicio montras malmulte konatajn verkojn de Attersee kaj montras, kiel Attersee influis kaj kunformis la artan evoluon ekde la 1960aj jaroj.

La ekspoziciitaj verkoj estas kolaĝoj, grafikaĵoj, fotoj, filmoj, muziko kaj pentraĵoj kaj samrange inventoj, arta metio kaj dezajnoj de produktoj. Pli novaj verkoj kompletigas la ekspozicion kaj montras la unuecon kaj homogenecon de lia arta verkaro.

Attersee prave diras, ke li estas pentristo, sed li estas multe pli:

Produktanto de filmoj, kantisto, skulptisto, dezajnisto de tapiŝoj, verkisto de tekstoj.

Christian Ludwig [krístian ludvig] naskiĝis la 28an de aŭgusto 1940 en la slovakia ĉefurbo Bratislavo (germane Preßburg). 1944 li venis al Aŭstrio kaj pasigis la junaĝon en Aschach bei Linz [aŝaĥ apud linc] kaj ĉe Attersee

([átersé], lago Atter). Li nomas sin Christian Ludwig Attersee ekde 1966, ĉar „Christian Ludwig” estas ofta nomo.

La juna artisto Attersee estis laŭ la opinio de kelkaj samtempoj la plej bela viro en Aŭstrio. Kiel velsportisto li gajnis premiojn en internaciaj velboatkonkursoj. En la jaroj 1957 ĝis 1962 li estis trifoje aŭstria ĉampiono. Poste li konatiĝis kiel pop-arta pentristo, konceptis scenajn dekoraciojn, muzikis, produktis sciencajn filmojn kaj verkis tekstojn.

1957 ĝis 1963 Attersee sukcese studis en la Universitato por Aplikita Arto en Vieno. Poste estiĝis liaj unuaj bild-cikloj „Veterbildoj” kaj „Ĉielarkaj Anomaliaj”. Li kunlaboris en diversaj publikaj art-agadoj kaj famiĝis per „Gegenstandserfindungen” (inventoj de objektoj) kun motivoj el la ĉiutaga vivo kaj erotiko: „Speisekugel” (manĝaĝ-globo), „Speiseblau” (manĝaĝa bluo) kaj „Attersteck” (Attersee-Besteck, Attersee-manĝilaro).

La aktuala ekspozicio en Belvedere 21 montras 250 objektojn de Attersee, ĉefe el liaj fruaj jaroj. La vizitanto povas fari vojaĝon tra la 60 jarojn longa krea vivo de Attersee. La bildo Feuerstelle (fajrejo) el la jaro 2011 citas la fruan periodon de la artisto kaj estas samtempe reveno en la nuntempon. Multaj verkoj estas humuraj, sed ankaŭ pensigaj.

Attersee vivas nun en Vieno kaj Semmering. Li prezentis siajn verkojn jam en pli ol 500 ekspozicioj en multaj Eŭropaj landoj kaj en Usono. Detaloj troveblas sub

<http://www.attersee-christian-ludwig.at/de/aktuell>.

Pliaj informoj: <https://www.belvedere.at/presse21>

Walter kaj Renate Klag



Attersee kun manĝaĵ-globoj 1966  
Privata posedaĵo. Foto: Hanni Rühm-Klewan



„Attersteck“  
Foto: Walter Klag



Christian Ludwig Attersee, „Fajrejo“, 2011  
Privata posedaĵo. Foto: Johannes Stoll, © Belvedere, Wien;  
© Bildrecht, Wien, 2019  
Mischtechnik mit Foto aus 1968 auf Karton, 36 x 48 cm.  
Multobla tekniko kun foto el la jaro 1968 sur kartono.



Christian Ludwig Attersee, „Neidstück“, 1984, Privatbesitz.

„Envia Peco“, 1984, privata posedaĵo.

Foto: Arkivo Attersee, Wien, © Bildrecht, Wien, 2019

Acryl und Lack auf grundierter Leinwand, schwarzer Holzrahmen

Akrilo kaj lako sur fonfarbo, nigra ligna kadro

105 x 105 cm, Rahmenmaß: 118 x 118 cm





Christian Ludwig Attersee, „Hunda Mamzono”, 1966

Akrilo sur lino

Albertino, kolekto Essl




La Attersee-domo troviĝas en la 7a distrikto de Vieno, Mariahilfer Straße 78-80. Tiu domo, kiu inaŭguriĝis en la jaro 1996, estas vendejo de la internacia konzerno H & M. Por la domo li kreis fasadon el vitra mozaiko „Wetterhändler“ (vetera komercisto). Ĝi estas la plej granda vitra mozaiko en Eŭropo, 210 m<sup>2</sup>.

Foto Walter Klag 2019



Sur Attersee-domo



Mi ludas volonte false pianon,  
kantas volonte falsajn sonojn, tenas  
plej volonte neniun ritmon,  
dume estiĝas io nova,  
ĝuste Attersee-muziko.

Teksto kaj skribo: Attersee  
Tradukita de Renate kaj Walter Klag

## La lago Atter

Attersee estas lago en Supra Aŭstrio. Ĝi estas la plej granda lago, kiu situas tute en Aŭstrio. La areo estas 46 km<sup>2</sup>, la longeco 19 km kaj la larĝeco 3 km. La vorto „Atter” venas verŝajne el la malnovgermana lingvo kaj signifas „akvo”.



Litzlberg am Attersee, Gemälde von Gustav Klimt (1914/15)

La vilaĝo Litzlberg ĉe Atter-Lago, pentraĵo de Klimt.

Ambaŭ fotoj: Vikipedio.



Atterbitter (Attersee-Bitter) estas amara likvoro  
por helpi la digestadon.

Foto Walter Klag



Aŭtografo de C. L. Attersee  
okaze de gazetara konferenco  
en Muzeo Belvedere 21  
la 31an de januaro 2019  
Kolekto Klag

# Anoncoj kaj informoj

# Esperanto

## in Wien lernen

### **Weltmuseum Wien Heldenplatz**

**Jeden zweiten Montag, 16 bis 17<sup>30</sup> Uhr**

Nähe U2/U3 Volkstheater, Teilnahme frei

Anmeldung: [events.duolingo.com/vienna](https://events.duolingo.com/vienna)

### **Pizzeria Mafiosi, Wien 15**

**Jeden zweiten Donnerstag, ab 19 Uhr**

Anmeldung: [events.duolingo.com/vienna](https://events.duolingo.com/vienna)

Teilnahme frei

### **Eine Stunde kompakt**

für alle, die noch keine Esperantokenntnisse haben

Info: [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

Teilnahme frei

### **Esperanto-Blitzkurs**

**Herrengasse 9, Wien 1**

Info: [esperanto@onb.ac.at](mailto:esperanto@onb.ac.at)



# Der **Weltverband** der esperantosprachigen **Journalisten** stellt sich vor



Treffen von esperantosprachigen Journalisten in Kopenhagen

Der Journalisten-Weltverband **Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio**, kurz TEĴA, wurde 1946 in Schweden gegründet und 2008 in Vilnius neu organisiert. Als juristische Persönlichkeit wurde er 2008 in Litauen registriert.

Die Mitglieder kommen aus 39 Ländern in allen fünf Kontinenten. Jedes Jahr findet eine Generalversammlung statt, meist im Rahmen des Esperanto-Weltkongresses.

Der 104. Esperanto-Weltkongress findet 2019 in der finnischen Stadt Lahti statt.

TEĴA-Mitglieder zahlen  
15 € für 3 Jahre  
99 € für Mitgliedschaft auf Lebenszeit

Alle Mitglieder erhalten einen  
Presseausweis.

**[www.tejha.org](http://www.tejha.org)**



# RENÉ DE SAUSSURE

## Der Erfinder des universellen Geldes

Am 17. März 1868 wurde René de Saussure in Genf geboren.

Nach dem Studium der Sprachwissenschaft und der Mathematik verfasste er sein wichtigstes Werk "Über die Wortbildung im Esperanto".

1907 publizierte René de Saussure das Projekt einer universellen Währung, die er "Spesmilo" nannte. Aus dem französischen Wort "espèce" leitete er "speso" ab. Mil bedeutet 1000. 1 Spesmilo (Sm) = 10 Spescentoj (Sc) = 100 Spesdekoj (Sd) = 1000 Spesoj.



Diese Währung wurde offiziell von einigen britischen und Schweizer Banken verwendet.

Der Spesmilo (Sm) hatte den Wert von 0,733 g reinem Gold und konnte wegen der Goldbindung leicht in andere Währungen umgerechnet werden:

1 Sm = 2 Britische Schillinge = 1 Russischer Rubel = 0,5 US-Dollars = 2,5 Schweizer oder Französische Franken = 2,5 Spanische Peseten.

Die Münzen zu 1 und 2 Sm waren und sind bis heute begehrte Sammelobjekte und verschwanden daher schnell aus der Zirkulation. Seit 1919 hat der Spesmilo nur mehr numismatischen Wert.

1942 wurde in den Niederlanden die Universala Ligo gegründet. Diese Organisation trat für die internationale Verständigung und eine universelle Währung ein. Der Name dieser Währung ist Stelo (Esperanto: Stern; Mehrzahl Steloj). 1959 wurden Münzen zu 1, 5 und 10 Steloj geprägt, 1965 folgten drei Varianten einer 25-Steloj-Münze. Auch Papiergeld wurde herausgegeben. Die Steloj eigneten sich sehr gut vor allem für die Überweisung von kleineren Beträgen im internationalen Zahlungsverkehr. Auch diese Münzen und Geldscheine wurden eifrig gesammelt und sind heute sehr gesucht.



Zur 150. Wiederkehr des Geburtstages von René de Saussure am 17. März 2018 wurde eine silberne Medaille in Form einer Münze mit einer Nominale von 100 Steloj herausgegeben. Sie besteht aus 1 Unze Feinsilber 999/1000 (31,1 g), der Durchmesser beträgt 37 mm. Hersteller ist die Münze Österreich, eine Tochter der Österreichischen Nationalbank. Die künstlerische Feinarbeit stammt von Mag. Helmut Andexlinger, der Chefgraveur der Münze Österreich ist. Andexlinger leitet seit 2016 die Graveurabteilung der Münze Österreich. Er hat die Fachschule für Metalldesign in Steyr absolviert, danach studierte er Kommunikationswissenschaften an der Universität Wien. Zu seinen größten Erfolgen zählt das Design für die 2-Euro-Münze 2012, die in 17 Ländern in Umlauf ist; er gewann dafür einen Wettbewerb mit 800 Einreichungen.





Preis 49 € plus Versandkosten  
Bestellungen: [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

Esperanto ist im Aufschwung. In den letzten drei Jahren meldeten sich über 2 Millionen bei den kostenfreien Esperantokursen von lernu und duolingo an. Parallel dazu steigen auch die Teilnehmerzahlen bei Esperanto-Jugendkongressen.

Abbildungen von Stelo-Münzen findet man bei Wikimedia Commons unter <https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo>

## Daten und Fakten

1887	Das erste Esperanto-Lehrbuch erscheint
1905	1. Esperanto-Weltkongress in Boulogne-sur-Mer (Frankreich)
1908	Gründung des Esperanto-Weltbundes UEA in der Schweiz: <a href="http://www.uea.org">www.uea.org</a>
1912	Die ersten Spesmilo-Münzen werden geprägt
1922	Erste Radiosendungen in Esperanto (Newark und London)
1938	Gründung des Esperanto-Jugendweltbundes TEJO: <a href="http://tejo.org">http://tejo.org</a>
1959	Die ersten Stelo-Münzen werden geprägt
1965	50. Esperanto-Weltkongress in Tokio, der erste Weltkongress in Asien
1966	Pasporta Servo (1000 esperantosprachige Gastgeber in 90 Ländern) erscheint erstmalig: <a href="http://www.pasportaservo.org">www.pasportaservo.org</a>
1970	Das Definitionswörterbuch Plena Ilustrita Vortaro wird herausgegeben: <a href="http://kono.be/vivo">kono.be/vivo</a> oder <a href="http://vortaro.net">vortaro.net</a>
1980	Die Monatszeitschrift <b>Monato</b> erscheint erstmals: <a href="http://www.monato.net">www.monato.net</a>
1986 2004	Esperanto-Weltkongresse in Beijing, China
2001	Chuck Smith (USA) gründet die esperantosprachige Wikipedia: <a href="http://eo.wikipedia.org">eo.wikipedia.org</a>
2002	Der Internet-Esperantokurs lernu startet: <a href="http://www.lernu.net">www.lernu.net</a> Mehr als 250 000 Anmeldungen bis heute
2006	<b>Herzberg am Harz (Niedersachsen) wird offiziell Esperantostadt:</b> <a href="http://esperanto-urbo.de">esperanto-urbo.de</a>
2008	Erstmalig Esperanto-Prüfungen nach dem Gemeinsamen Europäischen Referenzrahmen: <a href="http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker">www.edukado.net/ekzamenoj/ker</a>
2011	Gründung von Muzaiko (Esperanto-Musik): <a href="http://www.muzaiko.info">www.muzaiko.info</a>
2012	Google macht Esperanto-Übersetzungen
2014	Erstmals Esperanto-Fernsehen: Google > <a href="http://esperanto.televido">esperanto televido</a>
2015	Duolingo – Neuer Esperantokurs für Englischsprachige, danach auch für Spanischsprachige: <a href="http://www.duolingo.com">www.duolingo.com</a> <b>Mehr als 2 Millionen Anmeldungen bis heute</b>
2017	102. Esperanto-Weltkongress in Seoul (Südkorea)
2018	Die 100-Steloj-Münze (1 Unze Feinsilber) wird herausgegeben
2018	103. Esperanto-Weltkongress in Lissabon (Portugal)
2019	75. Esperanto-Jugend-Weltkongress in der Slowakei
2019	104. Esperanto-Weltkongress in Lahti (Finnland)
2020	105. Esperanto-Weltkongress in Montreal (Kanada)



# Die junge Sprache für junge Menschen Esperanto hat Erfolg

- ▶ Die internationale Kultursprache Esperanto ist wesentlich leichter als Englisch erlernbar.
- ▶ Esperanto eignet sich sehr gut für die internationale Kommunikation.
- ▶ Esperanto ist Kommunikation und Kulturtransfer auf gleicher Augenhöhe für Menschen mit verschiedenen Muttersprachen.  
Mit Esperanto ist heute ein internationaler Wissenschafts- und Kulturaustausch möglich, ohne dass ein Volk deshalb diskriminiert ist, weil seine Sprache nicht als international bedeutsam angesehen wird.
- ▶ Mit Esperanto kann man die unterschiedlichen Aspekte des menschlichen Denkens und Fühlens ausdrücken.
- ▶ Esperanto bedeutet Selbstorganisation von Bürgerinnen und Bürgern und kommt ohne öffentliche Subventionen aus.
- ▶ Esperanto ist eine lebende Sprache, die sich wie andere Sprachen entwickelt.

**2 Millionen**

lernen Esperanto mit dem Gratiskursen von *duolingo*.

**250 000**

lernen Esperanto kostenfrei mit [www.lernu.net](http://www.lernu.net)

Noch nie haben so viele Menschen Esperanto gelernt wie in den letzten drei Jahren.

**Wikipedia in Esperanto**

**240 000** Artikel    [eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org)

Das Geld der Esperanto-Gemeinschaft:

[commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo](https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo)



Venu al la

# Esperantista Kulturdomo Grésillon



per Esperanto



per Esperanto



per Esperanto



per Esperanto



per Esperanto



per Esperanto



per Esperanto



per Esperanto



per Esperanto



per Esperanto

[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

M.C.E., kastelo Grésillon, 49150 BAUGÉ, Francujo



Esperanto-Kulturhaus  
Schloss Grésillon

## Nächste Veranstaltungen

12. - 16. April 2019 Chor-Treffen von Interkant'  
mit Zdravka Bojčeva

12. - 16. April 2019 LandArt, Kunst und Natur  
in Gresillon mit Nathalie Dubrulle

26. April - 4. Mai 2019 9. PRINTEMPaS,  
Intensiv-Kurse mit Przemek Wierzbowski,  
Christope Chazarein, Marion Quenut

3. - 4. Mai 2019

9. PRINTEMPaS, internationale GER-Prüfung  
in Esperanto

28. April - 4. Mai 2019 2. Wanderwoche  
(in Esperanto) mit Olivier Buisson



# Internationales Esperanto-Museum

Wien 1., Herrengasse 9

Haltestelle Herrengasse der U3

☎ 0043 1 534 10 730    💻 [esperanto@onb.ac.at](mailto:esperanto@onb.ac.at)

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h

Donnerstag 10 bis 21 h

**Esperantokurse und Führungen auf Anfrage.**



Im selben Haus befinden sich auch die

**Sammlung für Plansprachen,**

die

**Musikaliensammlung**

und das

**Globenmuseum**

Unverkäufliche, private Ausgabe – Nevendebla, privata eldono